



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Julio 2008

3. évfolyam 35. szám

Tartalom

JULIO	3
La 2008-a, estas ankaŭ jaro de la rato	5
La Ĉina Antaŭdiro	7
Zodiako (Huangoao)	8
2008 estas Jaro de la Rato	8
HOROSKOPO 2008: KION PORTOS LA RATO?	9
Informoj	10
Klara Domahidi	12
Leciono de naĝo	12
La 2008-a, estas	14
LINGVO – LINGVOJ	14
RENKONTIĜO EN LA ESPERANTO-PARKO	20
ŜERCO	23

NORDHUNGARIA INFORMO

Julio 2008

JULIO

Karaj niaj legantoj!

Ĉu Vi scias, ke tiuj popoloj komencis unue registri la historieton de malkovro de Tero, kiuj apenaŭ depaŝis el la ŝtonepoko. Tiuj estis: la Polinezioj, kiuj ŝipadis- helpe de mapoj faritaj el bambuokano kaj el konkoj en iliaj simplaj sed bone konstruitaj boatoj – sur la Pacifika Oceano/ kio ankaŭ tiam ne estis ĉiam trankvila/, por konkeri la de ili malkovritajn insulojn.

Sed, Ĉi tie estas menciinda ankaŭ la **reĝo de Mali Abubakari** – el inter la *Afrikaj termalkovrantaj vojaĝantoj* – kiu ekiris per lia tuta ŝiparo. Lia eksperimento malsukcesiĝis, sed tiu tiras neniom el ĝia grandeco. Inter la same elstaraj malkovrantoj estis: Grekoj, Romianoj, Persoj (Dario, Aleksandro La Granda...), Portugaloj, Hispanoj, Britoj, Francoj, Germanoj, Rusoj, Nederlandanoj, Hungaroj kaj filoj de multaj aliaj nacioj.

De la etinfanaĝo al la plenkreskuliĝo la homon ĉiam altiris la ekkono de la ekzistanta mondo.

Sekve el la ĝis nun vivantaj, inter niaj nenombreblajn miraklojn malkovrintaj homfratoj ni prezentos kelkajn, kies vivovojo ligiĝas al la monato Julio:

La 1-an de Julio 1818

naskiĝis **Ignaco Semmelweis**, hungara akuŝisto. (†1865)

Li estis profesoro de akuŝoscienco en la Universitato Budapeŝta; ekde 1855. Lia klasika libro pri la puerpera febro aperis en 1861, laŭ la titolo: *Die der Begriff und die Prophylaxe des Kindbettfiebers*.

La homoj rekonas sinjoron Ignaco Semmelweis kiel savinton de la patrinaj, kiel fondinton de la asepsa vundkuraco. Lian memoron gardas hospitalnomo en Miskolc. En Hungario lia naskotago estas: Tago de la Sanitaraj Gelaboruloj.

La 1-an de Julio 1914

mortis **Aladár Zsélyi** (Ĵeji, naskiĝis en 1883) maŝin-inĝeniero, aviadilplanisto, pioniro de la hungara aviado.

La 2-an de julio 1953

Imre Nagy estiĝis la nova estro de la Ministrokonsilio anstataŭ Matiaso Rákoŝi. Prezidanto **Emeriko Nagy**, post nia 1956-a revolucio, la 17-an de Junio 1958, laŭ la fikciita akuzo: "Partopreno de Kontraŭŝtata krimago" estis prijuĝita kaj ekzekutita. La nuna postepoko donis justecon por li.

La 4-an de Julio 1918

mortis **Jozefo Lévy** (nask. en 1825) poeto kaj arta tradukisto. En Miskolc, lian memoron gardas skulptaĵo kaj nomo de la Kalvinana Gimnazio.



Jozefo Lévy

La 9-an de Julio 1953

La 11-an de Julio 1819

La 30-an de Julio 1886

La 4-an de Julio 1921 mortis **Antoni Grabowski** pola inĝeniero, kiu pere desiaj tradukoj multe antaŭhelpis, ke Esperanto iĝu literatura lingvo. (Tradukoj ekzemple: Boleslav Prus: La Faraono, Adam Mickiewicz: Sinjoro Tadeo...)
naskiĝis **Nándor Fa** (Ferdinando Fa) hungara veladisto, kiu dum 717 tagoj ĉirkaŭveladis la Teron.
naskiĝis **Antal Reguly** (Reguj) hungara etnografisto († 1858), kiu sciencsploris la lingvoparencojn de hungara popolo.
mortis **Ferenc Liszt** (Francisko List) hungara komponisto kaj pianartisto.



Ferenc Liszt

La 31-an de Julio 1935

naskiĝis **Imre Antal** pianartisto, grava televida personeco kaj humoristo. († 2008)

Dum Julio faras sian festan kongreson la Universala Esperanto Asocio en Rotterdam Nederlando, okaze de sia 100 jariĝo. En la landaj Esperanto-Asocioj kaj ankaŭ en la ceteraj kunulorganizaĵoj oni rememoras pri tiu ĉi grava okazintaĵo.

(Laŭ la hungara wikipedia la indikojn kompilis, verkis: Adrienne Pásztor)



La miŝkolca „Lévay József” Reformata Gimnazio (kie en 2007, okazis ekspozicio de Esperantlingvaj libroj kaj eldonaĵoj)

La 2008-a, estas ankaŭ jaro de la rato

Ankaŭ la plej famaj ĉinaj saĝuloj ne scias; kiam estiĝis la unua ĉina horoskopo. Nur tio estas direbla precize, ke ĝi povis okazi antaŭ pli ol 3000 jaroj.

La ĉina horoskopo kaj astrologio tial estas tiome popularaj en la mondo, ĉar la individuo ricevas tre multflankajn kaj precizajn orakolojn.

En Ĉinio en la provincoj aliaj – kaj aliaj legendoj disvastiĝis pri devenon rilate al la ĉina horoskopo, sed la subaj estas la plej konataj.

Laŭ unu legendo la 12 ĉinaj zodiaksimboloj, kiuj konsistas bazon de ĉina horoskopo, tiel estiĝis; ke Budho al si mem invitis la bestojn vivantajn sur la tero. 12 alvenis al la invito, kaj la jaroj ricevis siajn nomojn laŭ alvena vicordo de la bestoj:

Unue alvenis la Rato, poste la Bizono, poste venis la Tigro, Leporo, Drako, Serpento, Ĉevalo, Kapro, poste la Simio, Hundo, Koko kaj fine la Porko.

Laŭ alia legendo; en la montregiono vivis iu demono damaĝa, kiu estimis nek sinjoron de Ĉielo. De li ne malproksime, loĝis sanktmaniere vivanta homo, kiu manĝis nur unumankavan rizon potage kaj potage preĝis al la ĉielanoj.

Foje, kiam li preĝis ekstere, ektondris la ĉielo kaj unu fulmo entranĉis en arbaron, sed nek fulmado, nek tondrado aŭdiĝis, kaj fajro ne ekbruliĝis, sed el mezo de la arbaro infanploro aŭdiĝis. La sankta homo eniris la arbaron kaj trovis plorantan infanon. Li hejmenportis tiun kaj tutedukis. Tiu iĝis admirinde bela knabino.

La damaĝspirito priinformiĝis kaj iris al la sanktulo: „Se vi ne donos al mi 12 fajnpertojn ĝis plenluno, mi forrabos vian filinon.” – diris li.

La sanktulo malesperiĝite kuradis al ĉiuj, sed la riĉuloj ne havis koron por peton plenumi, la malriĉuloj ne havis fajnpertojn. La kompatindulo pleregante sidiĝis subarbo. La Rato tienvenis kaj demandis: kial li ploras tiel mizere. La sanktulo rakontis al ĝi sian malĝojon. La Rato forkuris. Li revenis baldaŭe kun la Bazono, Tigro, Leporo, Serpento, Ĉevalo, Virkapro, Simio, Koko, Hundo kaj la Porko. Ĉiu portis unu fajnperton en sia buŝo, sed unu perlo ankoraŭ mankis tiam. La sanktulo preĝis al la Granda Drako, kiu konsideris lian peton kaj aperis, portante la lastan unu perlon. Matene la demono venis pro la knabino, sed la sanktulo transdonis la perlojn al li, kiu polvbruliĝis tiam pro kolerego..

Budho tiel decidis, ke li gratifikos la bestojn pro tio-ĉi, kaj li prinomos la jarojn pri ili, kaj la naskitoj de la jaroj ricevos la proprecojn de la bestoj. Sed la Drako ricevos tiun jaron, kiu havas specialan influon al la pliaj jaroj.

Sed, ankaŭ klarigaj historioj ekzistas po provincoj.

La klarigo de la ĉina horoskopo

La ĉina horoskopo, kiel ankaŭ la azia pensado kaj mondkoncepto jam sia baze flankeniĝas de la eŭropana.

Ĝi observas la mondon en ĝia tuto kaj interrilatoj, en ĝia pleneco, do ankaŭ en ĝiaj interrilatoj ĝi ekzegezas!

Ĝi ne restas en la detaloj, plie ĝi rigardas la tuton, kiel unu globalan procezon, kaj ties parto kaj kreelemento estas ankaŭ la individuo.

La kreantoj de la ĉina horoskopo, faras siajn kalkulojn laŭ la lunjaroj!

Unu plena ciklo daŭras 60 jarojn! En ĝi interne estas la pli simplaj cikloj, kombinite per 5 elementoj – per metalo, fajro, tero, akvo kaj arbo. Unu simpla ĉina cirklo daŭras 12 jarojn, oni nomis la jarojn pri 12 zodiakaj bestoj. La elementoj transformigas unu en alian en nerompebla cirkulado. *La metalo* fandiĝas je efiko de fajro, kaj ĝi iĝas likva, simila al akvo; *la akvon* trinkas la radiko de *la tero*; el *la arboligno* iĝos fajro, *la flamo* ŝanĝos la arbon al cindro-grundo, *en la grundo* estiĝas la metaloj; ktp. Inter la du elementoj la reciprokaj influoj estas la sekvaj:

Regadaj reciprokinfluoj: la fajro regas la metalon (Fandas), la akvo regas la fajron (ĉesigas), la arbo regas la grundon (per radikoj), la metalo la arbon (hakilo, tranĉilo). Tiuj – ĉi reciprokinfluoj montriĝas ankaŭ en vivoj de homoj. Ekzemple: homoj naskitaj en jaro de arbo, povas esti sukcesa, se tiu okupiĝas per arbaro, agrikulturo, aŭ per iu alia, sed per grundo rilatan profesion ekzercanta daŭre(ĉar la arbo regas la teron).

Sed, povas esti, ke fiaskon atingos triu okupiĝante per metalindustrio (metalo), metalurgio (fajro), aŭ per fiŝkaptado (akvo).

La Ĉina Antaŭdiro

En Ĉinio la antaŭdiro de la pratempoj ĝis nun estas grandsignifa. La plej fruaj arkeologiaj restaĵoj de la orakolo estas konataj sur teritorio de Ĉinio, jam ankaŭ el malkovritaj neolitaj areaj kulturoj; sed la unuaj memoraĵoj de Ĉina-Orakolo devenas pruveble el tempo de la dinastio Shan-Yin, el mezo de la antaŭkrista dua jarmilo.

Tiam la esenco de la orakolceremonioj estis, ke la antaŭdiristo atendis respondon de la diaĵo laŭ unu aparte prilaborita, tre komplika rito, al tiuj demandoj, kiuj okupis la tribanojn (ekzemple: la vetero, nilitsukceso, bonrezulto de ĉasado, kvalito de la agra-rikolto, ktp) oni uzis al la orakolo, laŭorde unu skapoloston de iu hufa besto (ŝafido, cervo) aŭ ventran karapacon de testudo. La aŭguristo faris plu da kavaĵo sur la osto – laŭ la preskribita ordo, poste li surĉizis la demandojn faritajn al la diaĵo aŭ al la praŭloj. Oni tiel tekstigis la demandon, ke la respondo povu esti unusenca al ĝi (jesa, aŭ nea). Post ĉi tiu ago, oni trabruligis la pli frue pretigitajn kavaĵojn estantajn sur la osto, aŭ karapaco per unu varmegigita bronzbastoneto – sekve la aŭguristo aŭ mem la regnestro komentariis la orakolon pri fendetoj estiĝantaj sur la malantaŭflanko, kaj oni fiksas la rezulton apud la demando.

Nuntempe ni nomas ĉi-tiujn: orakolostoj, kiuj estas la unuaj memoraĵoj ankaŭ de la Ĉina skribo.

La scienca nomo de la skapol-osto estas= scapulomantia : Skapolomantio.

Ankaŭ dum tempo de la *Zhou-epoko*, la orakolado havis gravan rolon. Sed ĉi-tiam jam la planto: Akileo (latine: Achillea Millefolio) aperis apud la testudkarapaco, inter la orakol-iloj. En la antikvaepoka Ĉinio, la songinterpretado estis disvastiĝinta larĝskale. Tempopase la ekzerco de la orakolado perfektigis, la antaŭdiristoj aplikis ĉiam novajn kaj plinovajn Astrologiajn-tabulojn, tiutempe pretiĝis ankaŭ la unua horoskopo.

En la Ĉina-Antikvaepoko aperis kaj gravan karieron enkuris ankaŭ la **Terorakolo (Feneshui)**, aŭ **Geomantio**.

La **Radikoj de la (Xiang) Orakolo pri la vizaĝtraĵoj (Fiziognomio)** etendiĝas same ĝis la Antikvaepoko.

La plej malnova kaj plej grava faklibro de la orakolado estas la **Libro de Ŝanĝiĝoj (Yijingo)**, Kiu elkonstruis sian sistemon el apliko de alterno de fortoj Yin kaj Jang (Jino kaj Jango).

Kaj la 64 orakolsignoj – konsistante la trigramojn – servis per konsiloj al pr. ĉiuj aferoj de la vivo.

Do, la Ĉina orakolo, do la Ĉina horoskopo, estis ĉiam unu el la plej gravaj antaŭdiroj.

La Taoistoj, (de Taoismo) arigis grandaampleksan materialon, koncerne la Astronomion kaj Astrologion. Ili sistemigis tiujn, kaj pretigis astronomiajn mapojn, astro-katalogojn, kaj multegan interpreton de la Ĉina horoskopo.

Pri multaj-multaj orakol-libroj, astronomiaj kalendaroj, magiaj-aŭgurekzercadoj skribitaj manlibroj estiĝis iloj en manoj de taoistaj-antaŭdiristoj, haruspeksoj, sorĉist-laŭtegmentoj kaj Horoskop-preparistoj.

La antaŭdiro strikte interplektiĝis per la magio ĉe la Taoistoj.

La antaŭdiro same traefikis la ĉiutagan vivon de la popolo kaj reganto kaj de ties tuja ĉirkaŭaĵo de naskiĝo ĝis morto. Krom tiu-ĉi, ĉiam en ĉio (naturajn fenomenojn, neatenditajn eventojn) oni povis malkaŝi bonajn aŭspiciojn kaj omenojn, kiuj influis ilian vivon, sorton.

La disvastiĝanta Ĉina Zodiako en Orient-Azio, konvenas al la 12 cikloj de la planedo Jupitero. La sekvaj bestoj signas la unuopajn fazojn: Rato /muso/, Bovo/bovino/, Tigro, Leporo, Serpento, Drako, Ĉevalo, Ŝafo/kapro/, Simio, Koko/kokino/, Hundo, Porko/apro/.

Zodiako (Huangoao)

La tradiciaj ĉinaj 12 jaroj konsistas 30 aŭ 29 tagajn *lunmonatojn*. Ĉiuj tagoj estas dividitaj al 12, duhoraj periodoj, el kiuj la unua daŭras ĉirkaŭe inter la vespera 11-a kaj la nokta 1-a horo. Oni asocias unu signon de la zodiako al ĉiu hor-periodo de la 12 horoj, kiu komenciĝas per la Rato, kiun sekvas laŭvice la Bovo, Tigro, Leporo, Drako, Serpento, Ĉevalo, Kapro, Simio, Koko, Hundo, kaj fine la Porko.

Oni kreas la jarojn per kombinado de la serio de elementoj de la du cikloj.

La unua serio estas la 10 „**Ĉielaj Trunkoj**”, la alia estas la 12 „**Teraj Branĉoj**”, per kies kombinado oni kreis ciklon, konstantan el 60jaroj, per kiu iĝis ebla la signo kaj kalkulo de la jaroj.

Oni same asociis unu beston de la zodiako; al ĉiu branĉo de la 12 „Teraj Branĉoj”; simile al la 12 horoj de la tago. Oni interpretis la bestojn de la ĉina zodiako kune kun aliaj naturfenomenoj, kaj aplikis al interpreto de ĉielaj kaj teraj signoj, fenomenoj, aŭ kiel antaŭsigno de aŭspiciaj aŭ omenaj eventoj. La neellasebla zodiako estis grava ilo por preparo de la horoskopo, jam de longaj jarcentoj; okaze de grandsignifaj eventoj, kiam oni devis decidi pri la favoraj tagoj, aŭ devis sondi la atendeblan estontecon, ekzemple: geedziĝon, naskiĝon, morton. Al la zodiako ligiĝas pli da legendoj, onikredoj.

El inter ili unu rakontas tiun, ke la kato kial ne estas inter la 12 bestoj.

Laŭ la historio de – la ĉina sinjorino Qiingsin yundanfenqin1@163.com -, unu rakontas tiun, ke la Kato kial ne estas inter la 12 bestoj.

Laŭ la historio „la Rato kaj la Kato estis tre bonaj amikoj. Foje Xuannyuan imperiestro volis elekti 12 gardistojn. La Kato petis la Raton helpi sin anonci. Sed la Rato forgesis. Do, inter la dek du simbolaj bestoj ne estas la Kato. De kiam la Kato fariĝis ĉiama malamiko de la Rato.”

„La Rato englitis en la nazon de la Elefanto. La Elefanto povis nur kuri pro tio. Tiel alvenis unue la Rato, kaj iĝis la unua simbola besto.”

Tiel forrestis la Kato pri tiu evento, kiam Budho volis prinomi la lunmonatojn pri la antaŭ li aperantaj 12 bestoj.

2008 estas Jaro de la Rato

La ĉina nova jaro komenciĝas la 7-an de Februaro kaj ofertas grandozajn eblecojn por ni ĉiuj.

Ĉi jaro ankaŭ tial elstaras, ĉar la zodiaksigna-vico komenciĝas per la Rato-jaro kaj tiel ĝi signas grandegan eventoplenecon, komencon de novaj aferoj kaj la senesperajn aferojn oni povas rekonstrui ja el ties ruinoj.

La jaro de Rato antaŭenigas la agon, la antaŭenigon kaj la gravecon de la grandaj entreprenadoj. Tial ni devas pasigi la plej multan tempon ofere por la antaŭenpaŝo, ni devas denove profundiĝi en plibonigo de nia laboro, kariero kaj nia financa stato, kaj baldaŭ fermu la pli fruajn malamikadojn-konfliktojn kaj komencu la puran vivon.

LABORO: Viaj fortostreĉoj povos akiri bonrezulton, ja vi vivas vian propran vivon kaj ĉi promesiĝas kiel supreniĝanta periodo en via vivo. Vi bezonos: rigoran laboron, diligentecon kaj gigantan engaĝiĝintecon, sed se vi ne rezignos, via sukceso estos garantiota.

MONO: Ĉe teritorio de financaĵoj=ĉefas la singlardeco. Vi vivos vian supreniĝantan periodon ankaŭ ĉi terene, sed tio ne signifas, ke vi ne devos atenti je la ŝparemecado kaj al la ĉiutagaj elspezoj. Vi povos arigi signifkvantajn monrezervuon, sed anstataŭ la elspezoj vi pensu plie pri la investoj.

AMO-AMORO: La unua parto de la jaro ŝajne montriĝas normala /averaĝa/: al la paroj konstantentecon, al la soluloj malgrandan ŝanĝon promesas ĉi-tempoperiodo. Sed, kiel komenciĝa la aŭtuno, vi povos havi interesajn renkontojn kaj se ĝis tiam vi ne trovos amon, la oktobro certe ŝanĝos la situacion.

KONTAKTOJ: Vi devas oferi pli da tempo al viaj geamantoj, geamikoj kaj al ceteraj homaj kontaktoj. Al ĉi tiuj ligite vi povos havi parton el multaj ĝojplenaj eventoj. Vi estos invitota al multaj sociaj eventoj Vi rifuzu nenion, vi kapablos akiri multajn interesajn kontaktojn, ĉi-jare. **SANO:** Vi ne povas permesi al vi mem, ke sidu hejme. Vi bezonos la necesan movon! Vi iru dehejmo pli ofte ol pli antaŭe, sportu, forlasu la superflujajn kilogramojn. KREDU, tiam vi fartos pli bone vin.

La rato-jarojn karakterizas senescepte la evoluo, tiel nek 2008 estas la periodo de la stagno!

La 2008-a estas jaro de la energio kaj svarmo, ĉi estas tempo de la ago kaj entreprenadoj! El vidpunkto de la individuo ĉi periodo estas de la grandaj eblecoj. Kvankam la naskitoj de iuj simboloj eble pliprofitos ol aliuloj, sed la eluzo de la eblecoj kaj la unuopaj fortecoj helpos multojn en tio, ke ili povu direktigi sian vivon en la ĝustan direkton.

HOROSKOPO 2008: KION PORTOS LA RATO?

Laŭ la ĉina horoskopo la jaro de la Rato komenciĝas la 7-an de Februaro 2008 kaj daŭras ĝis la 25-an de Januaro 2009-a. Rusaj astrologoj atentigas, ke ĉijare ni volas eksterordinare atenti la gardon de niaj sekretoj, ĉar ĉijare intrikantoj kaj oportunistoj iĝos antaŭen, kiuj atendas nur la eluzon de la hommalfortejoj.

La jaro de Rato portos ankaŭ progreson kaj sukcesajn sciencajn provojn.

Laŭ la legendo: „Kiam Budho invitigis al si mem la bestojn de la imperio, unue alvenis la Rato. „

La Rato povas forresti de nenio: tiu estas entuziasma, fervora kaj vera oportunisto. La samo pravas ankaŭ ĉe jaro de Rato. Ĝi ne nur signas la komencon de la bestaj jaroj, sed promesas ankaŭ novajn eblecojn kaj progreson.

La Rato-jarojn markas la inovacio: en la pli fruaj Rato-jaroj oni prezentis **la personan komputilon „Apple Macintos”,** kiu funkciis per grafika uzanta-surfaco kaj muso; ĉi tiam ekirigis la unuan **hejman video-ludo-konzolon /Magnavox Odyssey/** kaj estis inventita ankaŭ la **CD-ROM**. Oni inventis ankaŭ la **DNS-fingropremaĵ-esploron**, kiu grandmezure alligis la laboron de la policaro. Same en unu Rat-jaro oni ellaboris la unuan **lasero-aparaton**. En la plej lasta ratperiodo aperis la **reta-televidaro, la BBC**, ja ekirigis la laŭordan televidelsendon, 60 jarojn pli frue.

(El la tekstoj ricevitaj de sinjorino Katarina Bede – el la miŝkolca Biblioteko „II. Rákóczi Ferenc”- kompilis, verkis, tradukis: Adrienne, sinjorino Pásztor)

Ω

Informoj

UMEA

Karaj Legantoj!

Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) ĉijare festos sian 100-jaran fondiĝjubileon. El tiu okazo en Krakovo okazos la 16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso inter 13-18 de Julio 2008.

La partoprenkotizo (ĝi inkluzivas tranoktejon, manĝadon, ekskursojn kaj ĉeeston en la sciencaj programoj) estas 290 Euroj. Tuj post la aranĝo estos bonaj eblecoj veturi al la UK, Roterdamo. Aliĝojn akceptas kaj pluajn informojn donas D-ro W.Opoka pere de e-mail umea@interia.pl. Jam aliĝis grupo de hungaraj medicinistoj, kiuj planas komunan vojaĝon al Krakovo. Informojn pri la vojaĝo donas Katarina Faragó, e-mail: farago.kata@espmad.hu kaj peras ankaŭ aliĝojn al Krakovo.

D-ro Imre Ferenczy

Postkongreso de IFEF

Nowy kamień i drzewko w PARKU ŚWIATA - La nova E-memorŝtono kaj arbo en la PARKO de la MONDO. Międzynarodowy Kongres Kolejarzy Esperantystów w Malborku - La Postkongreso de IFEF en Malborko.

Fotojn kaj artikolon vidu en oficiala TTT-ejo de Distrikta Oficejo en

Malborko: www.powiat.malbork.pl ;

ankaŭ oficiala TTT-ejo de la Urba Oficejo de Malborko /"La Urbo de 36 ZEO-j"/ enmetis informon pri la E-solenaĵo en sia hejmpaĝo kun koloraj fotoj kaj kun la plano de la "Parko de la Mondo" kun ĉiuj 36 ZEO-j /unua loko en la mondo !!!/

eniru: www.malbork.pl (Atento: ĉi tie sur la ĉefpaĝo en la fenestreto serĉu/pole: "szukaj"/ enskribu vorto: esperanto kaj aperos multaj artikoloj kun koloraj fotoj pri la pli fruaj E-aranĝoj en Malborko).

Edward Kozyra, Prezes Malborskiego Koła Esperanckiego "KASTELO" - Prez. De E-Rondo "KASTELO"

Trajno ZAMENHOF sukcese ekstartis

Unuan de junio, je la 6 horo mi vojaĝis de Bjalistoko per novnoma trajno "Zamenhof" kun Klara kaj Ludoviko Zamenhof. Du aktoroj ludis rolon de geedzoj Zamnehof. En historiaj kostumoj Ili vojaĝis kuraciĝi "al akvoj". Fakte la majstro vojaĝis al suda (nuna) Pollando al Szczawno Zdrój (Sxcxavno Zdruj) por ripozi kaj kuracigi sin per mineralaj akvoj. La trajno adiaŭis prezidanto de urbo Bjalistoko, direktorino de fervoja kompanio, lokaj ĵurnalistoj kaj grupo de esperantistoj. Prezidanto Tadeusz Truskolaski post paroladoj, dankoj, deziroj, komunaj fotoj pendigis tabulon kun trajnomo sur unua vagono kaj per speciala fajfilo signalis ekveturon de la trajno. Trajno vojaĝis al urbo Bielsko Biala. Dum vojaĝo esperantistoj en trapasantaj urboj salutis la geedzojn.. **Mi** ĉestis aplaŭdan akceptadon en Varsovia ĉefstacidomo Warszawa Centralna. Poste esperantistoj atendis en urboj Piotrkow Trybunalski, Katowice kaj en Bielsko Biala. En vagonaro estis dismetitaj specialaj porokazaj, belege printitaj koloraj flugfolioj kun informoj pri Esperanto, ĝia kreinto kaj Universala

Kongreso en Bjalistoko en 2009j. Antaŭ ĉiuj stacidomoj en ĉiuj kupeoj tuta pasaĝeraro povas aŭskulti samajn informojn en pola lingvo kaj en Esperanto

Robert Kamiński



Zamenhof trajno
La foton sendis Ela Karczevska – Pollando

UEA
Karaj,

hodiaŭ matene la pola sejmo (parlamento) unuanime per 397 voĉoj proklamis rezolucion, kiu omaĝas la 100-jariĝon de UEA.

Amike, Barbara Pietrzak, la 12-an de junio 2008-a.

Konstanta ekspoziciejo pri Esperanto ekde septembro

Malgraŭ tio, ke Ĉeĥa E-Asocio ne ricevis la financon subtenon de la ĉeĥa Ministerio pri Kulturo, tamen, kunabore kun la urbaj instancoj de Svitavy, precipe la urba muzeo, la 20-an de septembro estos inaŭgurita la konstanta ekspoziciejo pri Esperanto en la granda salono de Domo de Ottendorfer, kiu estis origine konstruita kiel urba biblioteko kaj estis siatempe kun siaj pli ol 22000 libroj ne nur la plej moderna, sed ankaŭ la plej granda germanlingva bibliotelo en Moravio.

La inaŭguron de la nova Esperanto-muzeo promesis partopreni inter aliaj ankaŭ la direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno Herbert Mayer. La konkretan riĉan programon por la tagoj 20-a kaj 21-a de septembro vi trovos en ĝuste nun presata revuo Starto 2/2008 aŭ vi povas peti pliajn informojn ĉe Libuše Dvořáková <dvor.libuse@seznam.cz> el ĈEA-retkomunikoj

Fonto: Ret-Info:

<http://www.eventoj.hu>

Klara Domahidi Leciono de naĝo

La knabo nomita Zolĉjo hieraŭ iĝis kvinjara. Iretante suben sur la bordo ankoraŭ sonis en liaj oreloj la vortoj de sia baptopatro: „Nun vi jam vere estas granda knabo!”

-Bedaŭrinde ĉiu havas naskiĝtagon nur unufoje po jaro! Do ĝis la sekva mi devas atendi tutan jaron. La torto konsumiĝis, la gastoj hejmeniris. Ĉio iĝis malplena; pasis la atendado, la ekscito.

El la meditado abrupte vekis lin la voĉo de Gregĉjo.

-Venu, Zolĉjo, baniĝi.

-Saluton! Ja mi ĵus ekiris pro tio!

Ĉe la ĝardenfino de la familio de Zolĉjo la bordo ruiniĝis kaj ĉe la subo fluis la rivero Takta. Herbaĉo tutkovris la bordoflankon. Abunde verdiĝis urtiko, ramno, cerefolio; floris la sambuko. Ĝiaj telerformaj blankaj floroj inter la multaj verdaĵoj altiris la homan rigardon. Kvazaŭ blankjupaj feinoj tenintus ripozon tie. La naturo gaje etendiĝinte ridetis al ĉiuj. La varmeta somera venteto karese ektuŝis la vangojn de la knabetoj. Trankvilon eligis ĝia velura varmo. La tuta pejzaĝo radiis harmonion. La suno fajreris sur la supro de la kontraŭborda salikarbaro. La flava disko respeguliĝis de la akvo de la pigra rivero. Nur la flugilsiblado de akvaj birdoj rompis la profundan silenton. Ardeoj ekflugis, kriĉadis, sovaĝanasoj kaj nigraj fulikoj klopodis iri antaŭen en la kanarejo. Jam floris la tifao. La du knabetoj ŝiris por si pistil-spikojn; iom da tempo skermis per ili, poste konstatis egalstaton. Ankaŭ domaj anasoj de la ĉirkaŭaĵo iradis tien por baniĝi. Ili sentis sin bone inter la sovaĝaj. Kaj sur la bordo skrapadis kokinoj.

La du knaboj konis tiun pejzaĝon kiel siajn manplatojn. Ili konsideris ĝin plilongiĝo de siaj domejoj. Eĉ la gepatroj, se iam mankis iu ido, nur kriis kaj certe ricevis respondon el la direkto de la akvo. Ili metis nur unu kondiĉon: la knaboj restu ene de viddistanco.

La varmeta, malprofunda akvo de la rivero Takta invitadis la knabojn. Estis agrable, malvarmigis la korpon. Kvankam ili ankoraŭ ne povis naĝi, ili memforgese ŝprucigadis unu la alian, kaj ofte ekridis. Ili elektis lokon, kie la surfaco de la akvo estis libera, ne kovris ĝin lemno kaj ili evitis foren la insulon de trapo. Ili sciis propra-sperte, ke estas tre ege doloriga paŝi en ties malmolan, dornohavan frukton. Ili aŭdis pri tio, ke iam oni manĝis ĝian farunecan semon, sed iliaj gepatroj jam ne konis la preparmanieron.

La posttagmezo rezultis gaja kaj Zolĉjo baldaŭ forgesis la malgajecon kaŭzitan de la paso de sia naskiĝtago. Post la baniĝo ili sekigadis sub la suno; dume la anasoj okupis sian lokon sur la akvo.

-Rigardu tiujn stultajn kokinojn! Ili preskaŭ sufokiĝas pro la varmego, tamen ne iras en la akvon. Ili povus ja preni ekzemplon de la anasoj! Tiuj estas multe pli saĝaj.

-Ni instruu ilin naĝi. Poste ili estos dankemaj!

Ili kaptis blank-nigre ŝutitan kokinon kaj Zolĉjo kuŝigis ŝin sur la akvon. La kokino malespere klukadis, sed montris nenian emon pri naĝo. La knabo direktadis ŝiajn piedojn kaj klarigis.

. – Fidu min! Remu per viaj piedoj! Ne estas bone! Nu, lertu jam! – sed la kokino subakviĝis. Vane ili serĉis, ŝi ne reaperis.

. – Nun provos mi! Portu anason, tio naĝos antaŭe kaj la kokino naĝos post ĝi.

Kaj tiel ili agis.

- Ne kontraŭu, flugila bruto! Se vi ellernos, la plaŭdado estos ĝojplena!

La anaso ne kaŭzis problemon, sed ankaŭ tiu kokino estis sentalenta por naĝi kaj submerĝiĝis en la rivero.

- Ne malesperu! Mia paĉjo diris, ke se oni forte volas ion, indas eĉ multfoje lukti por tio.

Ili klopodis instrui tri pluajn kokinojn naĝi, kiam Gregĉjo ekhavis novan ideon.

-Mia paĉjo rakontis, ke li ellernis naĝi tiel, ke mia avo ĵetis lin en la profundan akvon kaj li devis elnaĝi iamaniere. Se la ĝentilaj vortoj ne sufiĉas, ni provu tiel!

Ili kaptis la lastan kokinon, kuris kun ĝi al la proksima eta lignoponto kaj de ties mezo ĵetis la kokinon en la profundan akvon. Ŝi kriĉadis iom, poste ŝia voĉo kaj vivo subakviĝis. La akvo tie apenaŭ moviĝis, ekmarĉiĝinte.

-Mi ne kredintus, ke inter tiom da kokinoj troviĝas nek unu talenta. Ja ni probis ĉion. Kie ni fuŝis?

-Mi ne scias; sed min tutpikadis la kuloj kaj mi estas malsata. Ni iru hejmen!

Vespere, post kaŝigo de la lastaj sunradioj, onjo Ilona, la patrino de Zolĉjo vane atendis hejmen siajn kokinojn.

-Kio povis okazi pri tiuj? Ĉu vulpo forportis ilin? Aŭ iu forŝtelis ilin? Ĉu entute valoras la penon okupiĝi pri ili, por ke aliuloj havu manĝaĵon? Kia damaĝo!

-Ĉu ne eblas, ke ili naĝis tra la rivero kaj ne trovas la vojon hejmen?

- Mia Zolĉjo! Kiajn demandojn vi havas? ! Kokinoj ne povas naĝi.

-Sed se ili ellernis tion de la anasoj?

-Kokinoj ne havas naĝhaŭton sur la piedoj kaj iliaj plumoj ne subfluetigas la akvon. Ili timas la akvon, ili neniam povus ellerni la naĝon. Ĉu vi scias ion pri ili?

-Mi kredas, ke tamen eble vulpo forportis ilin....

(Esperantigis László Pásztor- Rev: d-ro Endre Dudich)

**La 2008-a, estas
Jaro ankaŭ de la
LINGVO – LINGVOJ**

Eseo

-daŭrigo –

Parto III-a

La Eŭropa Unio estas multlingva areo, en kiu la limoj estas traireblaj, en kiu pli kaj pli da intereso kunligas la diverslingvajn homojn, konsekvence plie kaj plie gravas, ke la homoj scipovu altnivelan dialogon fremdlingve. De multjaroj la esperantistoj rekomendas la konsideron de Esperanto al tiu rolo. Sed, ĝis nun ne mult-sukcese.

Sinjoro Probal Daŝgupta prezidanto de UEA, - loĝanta en Hindujo – sendis al mi respondleteron kune kun kopio de respondletero ricevita de la kultura vic-ĉefdirektoro de UNESKO. Ilin vi povos legi malsupre:

„Estimata samideanino,

Jen, ĉi-sube, la teksto de la respondletero el Unesko por via uzo.

Due, responde al via demando pri la rilatoj inter UEA kaj Unesko -- en 1954, oni decidis en Unesko doni al UEA "konsultajn rilatojn". En postaj revizioj, oni ŝajne foje restrukturis la tutan rilataron, kaj dum iom da tempo Unesko simple ne havis rilatojn kun NRO-oj. UEA sukcesis restarigi kun ĝi rilatojn en nova kadro, kaj de tiam temas pri "operaciaj rilatoj". Mi scias nur ĉi tion, kaj ankoraŭ ne komprenas pli detale la situacion.

Laŭ mia kompreno Unesko mem ĉi-momente ne estas organize forta kaj atendas la plivigliĝon internan por povi kunagi kun aliaj, kun kiuj ĝi principe volus kunagi.

Nobel-premio kompreneble iom helpas al ni, sed oni ne havu iluziojn -- la homoj estas tre skeptikaj pri aliaj ricevantoj de Nobel-premioj, kaj ne multe shanghas sian sintenon pro io tia. Amike

Probal Dasgupta”

„Ref. CLT/CEI/CID/2008/032

20 February 2008

Dear Mr Dasgupta,

Thank you for your letter d.d. 22 January, requesting UNESCO's patronage for the project "Raising Language Awareness Using an International Language as a Bridge Language", which the Universala Esperanto-Asocio intends to develop during the International Year of Languages (IYL).

The main objective of the International Year of Languages (IYL) is, as stated in the relevant UN General Assembly resolution, to develop and intensify activities aimed at fostering

respect for and promotion of languages and multilingualism. As lead agency, UNESCO plays an advocacy, facilitating and monitoring role, whereas the implementation of concrete activities is ensured primarily by civil society and Member States through diverse and dynamic partnership schemes.

Sponsorship is granted only on an exceptional basis after consultation with UNESCO's National Commissions, but all partners are encouraged to participate in the mobilization by adding their initiatives to the online project list available at www.unesco.org/en/languages/2008.

In this context, we warmly invite your association to continue the implementation of this project and to intergrate its description in the IYL website. Moreover, we will be most pleased to incorporate this worthwhile initiative in our final report of the Year's activities.

We thank you for your interest and commitment and wish you much success in your activities.

Yours sincerely,
Francoise Riviere
The Assistant Director-General for Culture”

Sed, ankaŭ kelkaj bonrezultoj de kunlaboro de esperantistoj montras jam, ke la interkultura dialogo bele okazas inter la nacioj. Ties plej bela ekzemplo estiĝis antaŭ nelonge. Pri tiu-ĉi temas letero de la atestimata prezidantino de PEA: sinjorino Halina Komar, kiu aperis en la 2008. maja numero de revuo ESPERANTO, oficiala organo de UEA. Mi citas el la artikolo:

„Interkultura dialogo

Hungar’, Polo – fratoj estas
Glavo, glaso jen atestas!

La renkonto estis planita de PEA kadre de la Eŭropa jaro de interkultura Dialogo, kaj celis komenci la dialogon en tre ĝusta loko, ĉar la nordhungaria regiono estas vera miksaĵo de diversaj kulturoj – nacioj, religioj, lingvoj, kutimoj...

...Post tostoj kaj ekamikiĝo ni interŝanĝis adresojn, kun bona volo komenci kontaktojn ankaŭ inter regionaj registaroj. Esperantistoj ambaŭflanke pretas helpi lingve.

...Kompreneble ke dum la tuta tritaga aranĝo r e g i s l a l i n g v o E s p e r a n t o, ankoraŭfoje konfirmante, ke ĝi ebligas diverstemajn kaj diversnivelajn kontaktojn, kaj ke ĝi estas la plej taŭga ilo kaj rimedo por interkultura dialogo en eŭropo kaj en la mondo. Ni tion ja bone scias, sed per tiaj kaj similaj aranĝoj, kiuj engaĝas ankaŭ eksterulojn, n montras ke Esperanto povas servi gravajn celojn kaj aferojn.

Eŭropa unio sentas la bezonon kaj konas la problemojn de la unia multkultureco, pro tio ĝi atentis ĉi-jare pri ĉi temo. Ni uzu la ŝancojn de la Eŭropa-jaro de Interkultura dialogo por montri, konfirmi per diversaj eksteraj kontaktoj, la plej taŭgan rimedon por interkompreniĝo kaj dialogo!”

Sed ni scias ĉiuj, ke „ellerni etnikan lingvon, ne estas facila tasko.” Aŭ diru eble: tiu ago estas granda defio. Kaj ĉefe tiam, se tiu lingvo apartenas al alia lingvofamilio.” – konstatis tiun ankaŭ Tibor J. Szabadi, verkisto el urbo Nagykanizsa.

Leonard Orban rifuzas Esperanton en EU

La institucioj de EU, inspiras la multlingvecon de la civitoj.

Leonard Orban, la ano de la Eŭropa Komisiono kun respondeco pri multlingveco, komence de Februaro skribe respondis al la grandkvantaj komentoj de esperantistoj, aperintaj en la retforumo de EU pri multlingveco. Laŭ Orban ekzistas pluraj motivoj, pro kiuj Esperanto ne povas iĝi pontolingvo en Eŭropa Unio. Unuflanke li atentigas, ke kreado de kompletaj terminaroj por tute novaj uzokampoj de Esperanto estus enorma, multekosta laboro. Aliflanke li asertas, ke ekesto de pontlingvoj estas "historie spontana fenomeno socilingvistika, ne rezulto de decidoj leĝofaraj kaj politikaj". Samtempe li diras, ke li mem "ne kredas" je pontolingvoj, sed ne komentas la ĉiam kreskantan rolon de la angla kiel ĝuste tia pontolingvo en EU.

<http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/>

Pri la retpaĝo ni povis legi la plej gravajn kialojn de lia rifuzo de Esperanto.

„... La kadrojn de la plurlingveco de la Eŭropa Unio, unusence regulas la Porkolektiva-juro.

Unu lingvo nur tiam povas iĝi oficiala lingvo de la UNIO, se ĝi konvenas al tri kondiĉoj.:

Ĝi estas enkonstituciigita oficiala lingvo de iu membroŝtato; la menciita membroŝtato petas rekoni ĉi lingvon kiel UNIO nivelan oficialan lingvon, la pluraj membroŝtatoj aprobas unuanime.

Ĉi estas unu el tiuj kialoj, pro kiuj la Esperanto ne povos iĝi la **peranta lingvo** de la Eŭropa Unio. La alia kaŭzo interrilatas kun alia karakteriza propreco de Esperanto. En kazo de tiuj lingvoj kiel la Esperanto, al ĝia vort-trezoro ne ligiĝas pli grava socia kaj kultura realeco. Okaze de iu artefarita lingvo, vortotrezoron de plenaj fakteritorioj, oni devus krei, kaj de tio estas logdistancaj ekzercaj kaj financaj sekvoj....La tria kialo estas pli persona: mi ne kredas iun perantlingvan ekzist-raĵton:estu ĝi la Esperanto, latina, aŭ la angla.....”

Sinjoro Leonard Orban diras severan kritikon al ni. Tiun-ĉi kritikon ni ne tre ŝatas, ĉar kvankam ĝi antaŭenmontras, tamen retenas. Ĉi tie estas la celo: ni devas kunkolekti pli- kaj pli da fakvortoj pri la eble plej multe da tereno de la vivo, eĉ same, kiel la fervojistoj. Ni portu ĝin en la instruon kaj la ekzamenmaterialon. Kial? Ĉar tiuj vere bezonatas. Kaj ne nur por la uzantoj de unuopaj fakterenoj, sed ankaŭ pro la vortoj transprenitaj al la ĉiutaga vivo. Se ni konas pli kaj pli, ni povas sinesprimi pli bone.

Kaj ni pensu pri tio, ke lingvomaterialo neuzata perdiĝos. Mi neniam pensintus, ke dum la mezlernej-jaroj legitan kaj ekzercitan (malnov-anglan) lingvon de Shakespeare dramoj, mi povos uzi iam . Tamen tio okazis en 1969, en la frieslanda Leenwarden mi povis bone uzi, kompreni ĝin kune kun Esperanto. Ni pensas, ke la lernantoj kiuj lernas esperanton, nur por akiri diplomon, neniam iĝos esperantistoj. La scio ne perdiĝas. Mi esperas, ke iam ankaŭ ili returniĝos al uzo de Esperanto, se ili havos pli da tempo por okupiĝi per tio, kiam ili travivos ties iun bonflankon.

Oni devus instrui Esperanton larĝe, ke ĝi plenigeblu vere la rolon de la helplingvo.

S-ro Leonard Orban, tamen ne havas veron. Li parolis pri kialoj, kaj inter ili pri la leĝa. Nur pri tiu li ne pensis, ke la leĝoj ne estas eternaj, ofte ŝanĝiĝas en intereso de la vivcirkonstancoj. Oni kial ne ŝanĝus la nunan leĝon en intereso de la homaranismo, de la juŝteco, demokratio? Ja en EU oni parolas pri tiu, ke bazo de EU estas la multlingveco laŭleĝe, kaj kontraŭe ili tamen ne tradukas ĉiun tekston al la nacilingvoj, ĉar ĝi multekostas. Laŭ ne nur mi, sed ankaŭ multaj pensantaj homoj: se estus akceptata iu pli facile ellernebla

kaj uzebla lingvo ol la angla aŭ la latina, ankaŭ la traduko fluus pli facile de tiu en la nacilingvojn. Pripensu: kiam ekiris la fervoj-, aŭ la aŭtomobiltrafiko, aŭ la uzo de alispecaj veturiloj, ankaŭ tiam oni devis krei novajn leĝojn por helpi la homojn kaj malhelpi la akcidentojn, katastrofojn. Kial ne okazebus tiu ago same, rilate Esperanton? Ja, tiu viva lingvo jam pruvis, ke ĝi povas esti bone aplikata en terenoj de komerco, turismo, fremdultrafiko, per kiu oni transdonas sian kulturon al aliuloj.

Mi rakontas miajn du spertojn. Dum somero de la 1980-a jaro, unu finnlanda kantoĥoro faris viziton en Miskolc, al invito de la ĉi tiea kantoĥoro. Kune kun la finna kantoĥoro alvenis ankaŭ mia esperantista korespondantino el Tampere. La grupoj informiĝante, ke ni ambaŭ estas esperantistoj, ekinteresiĝis: kiel ni povus bonfunkcii kiel interpretistoj de la du grupoj. La tutnombro de la grupanoj estis 120. Sylvia Hämäläinen kaj mi interpretis tiel bone dum la interpret-prezento, ke dum la sekvaj tri tagoj ni iĝis la petitaj interpretistoj de la du grupoj. Ĉi sukceson mi ne povas forgesi.

Imagu, ĉi interpretista sukceso ripetiĝis dum printempo de ĉi 2008-a jaro (4-6. Aprilo), kiam okazis la Hungespola Renkonto, en kadro de la Interkultura Dialogo. Tiam la geedzoj Pásztor faris programon kaj aranĝis la renkont-aferojn de 51 membra pola grupo. Jolanta Kieres (la prezidantino de Esperanto Klubo de Novy-Sącz: Pollando) tuj poligis ĉiun esperantlingvan eldiron de Adrienne Pásztor, ĉar en la pola grupo ankaŭ neesperantistoj alvenis en urbon Miskolc: la urbestro de Byalistok, reprezentantinoj de Universitato de Łódź kaj de Urbeŝtaro de Łódź, krom la aliaj universitatanoj de Łódź. La rezulto de la elstara kunlaboro estis la kunfandiĝo de la du grup-partoj, kaj kelkuloj anonciĝis por lerni la internacian lingvon.

Se vi rigardos la foto-rubrikon: Pola Renkonto, sur la retpaĝo <http://kiralylajos.extra.hu>

Vi povos konstati, ke la humuro estis bonega, la per interna ĝojo hejtaj vizaĝoj brilis.

Sed, bedaŭrinde nur tiuj konas kaj scias pri la grandaj ebloj de ĉi lingvo, kiuj havas jam tiujn travivaĵojn. Ambaŭfoje ni verkis kaj disdonacadis informtekstojn pri la vidindaĵoj, valoroj de urbo Miskolc kaj de nia regiono. Por la ekskurs-grupoj tiuj donacoj iĝis necesaj aneksaĵoj ĉe la interkulturaj dialogoj.

Ni devas tiel klopodi, ke ĉiutere ne atingu rekonon de niaj landoj kaj de EU. Je tiu nun ekzemplo estas, ke la EU fincos la projekton:

„Per Esperanto traduki infanlibrojn al nacilingvoj. La Eŭropa komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu esperanto rolas kiel pontolingvo.

EU fincos per 64000 Eŭroj la projekton, en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

La eldonprojekto, kiun ellaboris por Kroata Esperanto-Ligo Zlatko Tišljar, kaj en kiu partoprenos kiel partneroj Edistudio el Pisa (Italio), inter-kulturo el Maribor (Slovenio) kaj barata eldonasocio Samatat Siksha – Samatat Prakashan el Kalkato, estis aprobata de kultura agentejo de Europas Komisiono (EACEA).

EU fincos la projekton per 64000 eŭroj. La projekto antaŭvidas ke ĉiuj partneroj (itala, slovena, kroata kaj barata) tradukos el siaj lingvoj unu infanlibron de sia literaturo al Esperanto. Poste la barata partnero plutradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la bengalan, kaj la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron ĉiu al sia nacia lingvo.

Post kiam ĉiuj eldonos la librojn, oni distribuos ilin en elementaj lernejoj de siaj urboj kaj organizos legokursojn inter la infanoj. La plej bonaj verkoj de la infanoj pri libro legita kaj apartenanta al alikontinenta kulturo estos premiitaj. Pri la tuto la eldonistoj daŭre informados la gazetaron, radion kaj televidon.

La barata partnero kunlaboras kun la prezidanto de UEA, Probal Daŝgupta. La projekto estos efektiva inter Majo 2008 kaj Majo 2010. Tiu estas la unua tiaspeca interkultura projekto uzanta Esperanton, kiun finance subtenas eŭropa Komisiono.

Raportis Zlatko Tiŝljar. (<http://www.liberafolio.org/2008/eubaratalibro>)

Mi bedaŭras, ke ni Hungaroj ne partoprenas ĉi projekton. Mi volonte tradukintus infanlibrojn, kunlabore la menciitaj esperanto organizaĵoj. Sed, s-ro Zlatko Tiŝljar menciis, ke en alia simila projekto ankaŭ Hungaroj partoprenas jam.

Kaj denove bona okazintaĵo:

En Svislando oni kandidatigis UEA, al NOBEL premio. (Laŭ la pola retgazeto Freŝo)

La antaŭeniĝo de Esperanto estas malrapida, tamen certa!

Oni ofte demandas min, ke ĝis nun oni kial ne enkondukis Esperanton en la lernejan instruadon. Kaj al la demandantoj, kaj, la vi mi diras la samon. Al la lingvoinstruo ni mem la homoj faras la ekonomiajn, homajn kaj politikajn barilojn.

En la libro de Gados László-Szabadi Tibor J: Az angol mint az európai lingua franca? (La Angla, kiel la eŭropa „lingua franca” (perantlingvo de la Mediteranareo) – mi legis, ke vere... la unua grava eksperimento okazis por internacie oficiale akcepti esperanton, dum la unuaj kelkaj asembleoj de la Ligo Nacioj, estigita post la Unua Mondmilito. La propono, kiu temis pri la por instrucele lerneja enkonduko de Esperanto, kaj kiun apogis esploraj rezultoj kaj rekonaj ekspertizoj, - iĝis flankenpuŝita pro la maĥinacioj de la franca kabineto, kiu timis la hegemonion de la franca lingvo.

Poste la politikaj situacioj jam ne favoris al nova propono.

En Hungario la socialisma ordo favoris al Esperanto, la ŝtato subtenis ĝian movadon kiel kulturan agadon. Post la politika ŝanĝiĝo tiu subteno grandparte ĉesiĝis.

Nuntempe por Esperanto ne estas favora, situacio, ke en Hungario multoj lernas Esperanton nur por akiri diplomon pli facile. La laborejoj ne postulas la fremdlingvo-uzon, nur la diplomon pri la sukcese finita lingvoekzameno de Esperanto. Tielmaniere vane okazas la instruado de la lingvo Esperanto, ĉar ne estas evoluo rilate la plimultiĝon de nombro de la lingvouzantoj de Esperanto, kaj nek la movado iras antaŭen. Regas ĝenerale la ideo: gajni pli da profito el la pli facile ellernebla lingvo kaj ne uzo de Esperanto. Ĉie, kie estas havantuloj de Esperanto-lingvodiplomoj en laborejoj, en lernejoj, ĉe kuracistoj, en la komerco, en ĉiu vivtereno – kie homo okupiĝas kun homoj – oni devus atesti, ke tie persono atestas Esperanton. Surskribu la laborejoj sur la pordoj nomkartoj: ESPERANTO UZATA!

En Nederlando, dum mia tiea 1969 jara vizito, mi vidis tiun en la Policejo - kiam kiel fremdulino mi devis anonci min, kie kaj ĉe kiu mi loĝas dum mia turistcela unumonata nederlanda restado, kaj krom tiu en la Poŝto-direktorejo, kie laboris miaj esperantistaj geamikoj.

Ekzemple en urbo Miskolc en bankoj, ĉe Policdirektorejo, doganejo... ktp tre multe laboras tiuj, ĉefe gejunuloj, kiuj ekzameniĝis en Esperanto/kaj nur al la baldaŭa diplomakiro/.

Mi prilaborigus pere de ili siajn laborejajn fakleĝojn laŭ kiuj ili faras sian laboron, sendepende de tiu fakto, ke la leĝoj ofte ŝanĝiĝas. Se iuj volas doktoriĝi el Esperanto, ilia diplomlabor-temo estu propralaborejaj laborleĝoj prilaborotaj per fakesprimoj. Certas, ke ĉi-maniere ilia lingva pluedukado certigota estus kaj tiu utilis ankaŭ el vidpunkto de pluevoluo de fakliteraturo de lingvo Esperanto.

Ĉar laŭ mia opinio plenkreskante ellerni Esperanton kaj poste neokupiĝi pri ĝi (la homo havas rajton) pro nura financa-profitakira vidpunkto, estas malhonesto ago ankoraŭ ankaŭ tiam, se ĝin kaŭzas la hodiaŭa kapitalista vidpunkto.

Se la instruon de Esperanto ni enkondukos en la bazlernejojn kiel fundamentigon de la pli malfruaj lingvoinstruoj, poste en mezlernejoj ni donos la mezgradan instruon de Esperanto el la nacia- kaj mondliteraturo kaj movadhistorio de Esperanto, poste en la universitatoj kaj ĉeflernejoj ni certigas, ke la studento esperantlingve povu ellerni la fakojn kaj sciencajn literaturon por supergrade ekzameni el ĝi, tiam ni atingos la nivelon de la multloke kaj multfoje pridiskutita angla lingvo.

Tiu ĉi metodo estus la konvena instrusistemo de nia lingva instrua koncepto! Ĉi tiun devus trapensi ĉiu esperantista pedagogo! Laŭ mi nur tielmaniere povos atingi esperanto la necesan rekonon Esperanto, kaj ĝuste la samon, kiun la lingvo angla. Se ni forrestas kaj ne agos same, la lingvo angla vere povos iĝi helplingvo de Eŭropo, kiel siatempe la „lingua franca”. Ĉar la angla lingvo estas instruata de bazlernejo ĝis universitato, sed oni komencas instrui ĝin jam ankaŭ en la infanvartejoj, de la kvar-kvina jaraĝo de la infanoj.

Mi konsentas pri opinio de László Gados, laŭ kio la lingvaj kaj ceteraj ŝanĝoj, rekonaj bezonas tempon. Ĉi tie mi mencias pri kiu ĝis nun eble ankaŭ vi ne aŭdis. Kiom multe da tempo bezonis la homaro por la eŭropa rekono de apliko de arabaj numeroj. Tiam ”la senindulga lukto daŭris dum la 12-15-aj jarcentoj...”

Esperanto havas ankoraŭ nun 120 jarojn. Tamen ni esperas, la lukto por akceptiĝo de Esperanto ne iĝos tiel longdaŭra.

La esperantistoj nomas sin pri la vorto espero. Ni esperas, ke ĉi bela, orelkaresa lingvo iĝos iam oficiala perantlingvo de la mondo kaj ne nur de EU.

Sed, ĝis tiam ni devos multe fini: influi, krei, pliigi la aron de konoj, ke Esperantio prosperiĝu kaj ni ne forgesu vortojn de Viktor Hugo, kiujn citis ankaŭ Georges Kersaudy en sia citita franclingva verko:

„UTOPIO ESTAS REALO DE MORGAŬO.”

Jen estas la titolo de la franclingva libro de Georges Kersaudy
Langues sans frontières. A la découverte des langues d' Europe.”
(Lingvoj sen limoj. – Malkovri la lingvojn de Eŭropo.)

Al la multlingvaj gestudentoj de la tria jarmilo.” Ĝin esperantigis d-ro Endre Dudich

(Reviziis László Gados)

d-ro Ferenc Jáki
Amoro – Ebrío

Mildeta venteto
formiĝas je ŝtormo,
galopa ventego,
sonora tempesto,
hurla uragano,
forta fulmotondro,
zigzaga ciklono,
turalta tornado,
torenta tajfuno
pliiĝas senĉese
febra amebrio,
kiam ambaŭ korojn
per fluganta sago
trapikas Amoro.

(Kantante Vivi – 2006 – Szolnok)

Stefano Pál

HISTORIO DE LA MISKOLCA ESPERANTO MOVADO
-daŭrigo –
PARTO V-a
RENKONTIĜO EN LA ESPERANTO-PARKO
1969-1976.
„Ni estu dankemaj, Kalocsay vivis.”

Fervojista renkontiĝo - Esperanto-parko.

La miŝkolcaj esperantistoj havas pli novan Esperanto-grupon. En la Vörösmarty- kulturdomo / Miskolc, str. Lenke. / fondiĝis nova fervojista grupo. La departementa komitato anoncas grandiozan lernokurson kaj konsultadojn por antaŭprepari al „A” kaj „B” ekzamenoj. Sukcese faris B-ekzamenon Maria Busai, instruistino de Szirmabesenyő.

Estraro de la klubo ankaŭ aparte salutas ŝin. La 10-an de majo 1969 oni aranĝas departementan studadan konkurson en gimnazio „Földes Ferenc”. Ĝiaj unuaj ses personoj akiris kvar premiojn dum landa konkurso.

En julio 1969, fraŭlino Adrienne Földi faris bildkartan prospektan prelegon pri ŝia junia vizito ĉe nederlandanoj (Leendert van Duijn, Jaap Katoen, Gerard Roelofs) kaj aŭstria (D-ro Adolf Halbedl) esperantisto farita vizitado.

La plej granda okazintaĵo estis en 1969 la Landa Esperanto-Renkontiĝo en Miskolc dum la Landa Fervojista Tago, kies motivoj estis la 60. jubileo de la fervojista Esperanto-movado kaj la 3 miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-fakgrupo.

Dum la dutaga renkontiĝo estis festa kunsido, inaŭguro de Esperanto-parko en Miskolc-Tapolca, ekskursoj al Aggtelek kaj Lillafüred, ekspozicio, kiujn partoprenis ankaŭ geesperantistoj de urbo Eger.

La departementa Esperanto- Komitato petis de 2. distrikta konsilio de la urbo en Miskolc-Tapolca stratnomigon pri Julio Baghy, sed tion oni nur ĝi promesis realigi pli poste. Sed la antaŭan peticion pri Esperanto-parko oni akceptis kaj tiel en Miskolc estas nun 4 memorlokoj pri Esperanto. La Esperanto-parkon D-ro Ludoviko Győry Nagy inaŭguris en Miskolc-Tapolca. La landan renkontiĝon sukcesigis subteno de 3 miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-grupoj kaj la B.A.Z. departementa Teritoria Esperanto Komitato.

Eksterlandaj gastoj - verkisto Mikelo Gergely

Gasto de la miŝkolca renkontiĝo estis el Nederlando K.Gd.Jong, eksprezidanto de Fervojista Esperanto-Mondasocio kaj Hugo Kraus, vicprezidanto de Aŭstra Esperanto Asocio, kiu fotis lokojn por la viena ekspozicio. Adrienne Földi reprezentis por ili urbon Miskolc, kaj ties ĉirkaŭaĵon. Marta Váry gastigis samideanon Hugo Kraus. Jong sinjoro estis gasto de Ludoviko Győry Nagy. La du samideanoj faris prelegon kun lumbildprojekciado pri belaj kaj de Nederlando kaj Aŭstrio kaj ties Esperanta-vivo. Estis sukcesa la Esperanto-programo de pioniroj de Nyékládháza. Bulgaraj kaj la hungaraj pioniroj donis komunan Esperanto-programon.

En Miskolc la 1-3-an de majo 1970, la 17 membra Esperanto-delegitaro de Pécs faris laborvizitadon. Dum tiu ili konatiĝis kun la instruadaj metodoj, rigardis esperantan kulturprogramon de lernejoj de Szirmabesenyő kaj Esperanto-memorlokojn de Miskolc.

La 31-an de majo 1970 inter grandnombraj bazgradaj lingvoekzamenantoj estis Ladislao Pásztor kaj inter mezgradaj lingvoekzamenantoj estis ankaŭ Adrienne Földi. La sukcesajn ekzamenantojn D-ro Ludoviko Győry nagy salutis dum la klubkunveno post la lingvoekzameno.

En decembro 1970 gasto de Zamenhof-vespero estis la en Varbo naskiĝinta Mikelo Gergely, budapeŝta verkisto kaj publicisto, ano de estraro de HEA, ĉefredaktisto de revuo „Hungara Vivo” kaj prelegis pri nuntempaj problemoj de la „Babela” multlingveco.

Sukcesaj programoj - ekzamenoj, klubvivo.

Prelegoj, raportoj, lernokursoj, ekzamenoj, okazis laŭsisteme en la fakrondoj. La Teritoria Komitato senĉese funkciis. La instruadon de plenkreskuloj kaj la lernejan instruadon oni devas plilarĝigi, ĉar ĉiam pli instruantoj faras instruadon de Esperanto. Kadre de la amikeca semajno 50 pioniroj de Szirmabesenyő 30 kantojn, poemojn de 17 landoj prezentas grandsukcese. Stefano Pál gvidas lernokurson ankaŭ en Vámosgyörk, kie la lingvoekzamenon el lingvo Esperanto ankaŭ D-ro Ludoviko Győry Nagy vizitas. En julio 1971 Adrienne Földi faris amikan vizitadon en Beográd, kie estis gastino de Antoni Sekelj, kiun ŝi konis ekde la 52 UK. Pri la vizitado kaj pri invito de Antoni Sekelj al Miskolc Adrienne Földi raportis al D-ro Ludoviko Győry Nagy.

En 1972 en Miskolc denove oni aranĝas A,-B,-C-ekzamenojn. Maria Busai faris C-ekzamenon per elstara rezulto. Estraro de la klubo ne forgesas pri pli nova propagando. En aŭgusto kaj en septembro en la miŝkolcaj tramoj kaj aŭtobusoj estas videblaj alvokoj je la lernokursoj. La 7-an de majo 1972 multe da samideanoj faris sukcese lingvoekzamenon antaŭ ekzamenkomitato de HEA. Ankaŭ Adrienne Földi akiris C-diplomon.

Somere de 1972 dum la Esperanto-Somera Universitato en Gyula partoprenis D-ro Ludoviko Győry Nagy kaj Adrienne Földi el inter la miŝkolcaj esperantistoj. Pri tiu Adrienne Földi raportis.

En 1972 oni aranĝis Departementan kaj Landan Junularan Renkontiĝon en Miskolc. Esperanto-fakrondo de „Rónai Sándor” Kulturcentro festis en aŭgusto 1972. 80. naskiĝtagon

kaj 60. esperantistan laboreman jaron de D-ro Ludoviko Györy Nagy, kiu partoprenis en Usono dum 3 semajna rondvojaĝo je invito de kaliforniaj esperantistoj.
En 1972 gasto de la fakrondo estis Ludoviko Kőkény.

Pedagoga renkontiĝo - Sukcesoj de miŝkolcaj lernejoj.

La 20-an de Februaro 1973 Adrienne Földi faris sukcesan supergradan ŝtatan lingvo-ekzamenon el lingvo Esperanto en la „Eötvös Lóránd” Scienca Universitato en Budapeŝto, pri kiu D-ro Ludoviko Györy Nagy raportis al membraro de la klubo. En aprilo 1973 oni aranĝis en Miskolc Landan Renkontiĝon de la Esperantistaj Pedagogoj. Oni aranĝis demonstraĵajn horojn pri lerneja instruado de lingvo Esperanto.

En Gyula dum la 6. Landa Esperanto-Konkurso la miŝkolcaj mezlernejoj akiris 3 unuajn lokojn, bazlernejoj de Szirmabesenyő 2 unuajn lokojn kaj unu duan lokon. D-ro Ludoviko Györy Nagy 19-an de Julio raportis pri la okazintaĵoj en Gyula Aŭtune de 1973 la TEK. Komencas 3 lernokursojn en la Rónay, Ady kaj Vörösmarty Kulturdomoj. En la klubo Árpád Szegedi esperantista iluziisto faris demonstraĵan prelegon, grandsukcese.

La 26-an de majo 1974 Ladislao faris sukcesan mezgradan lingvo-ekzamenon el lingvo Esperanto. Scion kaj entuziasmon de la ekzamenantoj montris tio, ke ĉiuj sukcese faris ekzamenon antaŭ la ekzameno-komitato de HEA./ antaŭ D-ro Ludoviko Györy Nagy, geedzoj-Pechan kaj Maria Busai. En 1974 oni pli intense ekzercis la konversaciadon en Esperanto, kaj konigis korespondadojn. Oni aranĝis Esperantajn vortludojn, analizis la pedagogajn ilojn, metodojn de la lingvoekzercado kaj esperantlingve raportis pri la okazintaĵoj, sepfoje oni prezentis diafilmojn per esperantlingvaj tekstoj.

Gastoj de la fakrondo pligrandigis nivelon de la kunvenoj. Ankaŭ ĉi-jare aranĝis ĉi tie Mikelo Gergely lian verkistan enketon kaj povis ĝui societon de Mikelo Kőkény, budapeŝta instruisto, kies miŝkolcaj kontaktoj jam estas tradiciaj. Denove estis en la klubo eksterlandanoj, dufoje oni akceptis polajn esperantistojn. Instruaĵa estis vizitado de sekretario de Esperanto-klubo de Zalaegerszeg kaj la reciproka spertointerŝanĝo.

Denove rolis pioniroj de Szirmabesenyő kaj Nyékládháza, kiuj prezentis sukcesan programon. La anoj aŭskulteblis raportojn pri la Budapeŝt-a Landa Renkontiĝo, pri la Salgótarján-a kulturprogramo, pri la Szolnok-a Landa Renkontiĝo. Oni sukcesis fari fotokopiojn pri folioj de Esperanto-albumo, kiu prezentas la 10 jaran laboron de bazlernejo de Szirmabesenyő. D-ro L. Gy. Nagy raportis pri la malsupra-Danuba kaj jugoslavia vojaĝoj. Al lia diamantdiplomo anoj de la grupo gratulis.

En 1974 Adrienne Földi kiel rekono de ŝia farita turisma agado, cele de ties daŭrigo, iĝis sekretario de TEK. Adrienne Földi finas tiun lernokurson, kiun komencis Márta Váry, sed pro la malsano ne povis fini. Poste ŝi gvidas propran lernokurson, el inter ties aŭskultantoj unu persono aliĝas al la Esperanto-klubo.

En Esperanto-klubo de „Rónai Sándor” Kulturdomo denove rolis rememoroj. Oni memoris al Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Zamenhof, serio aŭdiĝis el historio de Esperanto. Estis grandsignifa, ke Antoni Sekelj – kiun Adrienne Földi invitis al Miskolc /ŝia korespondamiko estis ekde 52.UK./ - venis al Miskolc. Raporto de la jugoslavia eminenta esperantisto ĉiujn ravis, kiu parolis pri la jugoslava esperanto-vivo, ilustrite per koloraj beogradaj diapozitivoj. En ĉambro de Galerio estis aranĝite raporto de Emerigo Kutas, ĉefsekretario de HEA pri la UK de Kopenhago. Oni konigis esperantlingve vivon de Bartók, vivon de Federikon Karinthy kaj Esperanto-tradukaĵojn de skribaĵoj de Mikelo Gergely. Pro la riĉaj, enhavaj programoj multe da homoj vizitis la klubokupiĝojn.

Tiu ĉi tempe ankaŭ la fervojistaj esperantistoj estas aktivaj. Ili invitas la budapeŝtajn prelegantojn, kvinfoje partoprenas eksterlandajn aranĝaĵojn, en fervojistaj renkontiĝoj reprezentas la miŝkolcanojn.

La 1-an de junio 1975 antaŭ ekzamenkomitato de HEA denove multe da homoj faris diversgradajn lingvoekzamenojn. Inter la supergradan C-diplomon akirantoj estis la miŝkolca Ladislao Pásztor kaj la en Szikszó ankaŭ instruanta kaj poemojn skribanta Mikelo Farkas. Pri demonstraĵa instruado de Mikelo Farkas delonge rememoris ĉe estraro de HEA pro iu lia poemo, kiun skribis por la infanoj, por instigi al lernado de Esperanto:

„Lundo, mardo kaj merkredo,
Kaj ĵaŭdo kaj vendredo,
Venas sabato, dimanĉo,
En ĉiu tag’ Esperanto!”

La 20-an de Septembro 1975 okazis memoriga evento de nia klubo. Du entuziasmaj geesperantistoj geedziĝis: Adrienne Földi sekretariino de TEK, kaj Ladislao Pásztor, sekretario de Esperanto-fakrondo de „Rónai Sándor” Kulturdomo. Okaze de tiu ĉi, Ludoviko Gyóry Nagy partoprenis la ceremonion, gratulis al la juna paro, poste aranĝis intiman klubvesperon en oktobro, kaj ili ricevis nuptodonaĉon.

- ni daŭrigos -

(Rev. Teo Andreas)

ŜERCO

Fajnaj manĝaĵpecoj atendas a novedzon hejme.

- Kion vi kuiris hodiaŭ, karulino?
 - o Mi ne scias, ĉar la etikedo deĝluiĝis de la konservskatolo.

Esperantigis László Pásztor





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: pasztor.laszlo4@chello.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu